

## Stefan MacGill



Naskiĝis en Nov-Zelando en 1948. Denaska esp-isto.

Kunfondinto de Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964) kaj aktivulo tie ĝis 1972. Studis en Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (69-75), ĉefe geografion. Diplomiĝis instruisto por elementaj lernejoj en 1974.

Volontulo (la dua en la programo) en la CO de UEA (1976), oficisto (1977-86). Redaktoro/kunordiganto de Jarlibro (76-86), teknika redaktoro de Kontakto (78-86). Vicprez de TEJO (77-79), prez. 1979-80). Direktoro de CO (1980-84).

Redaktoro de Juna amiko (1986-96 kaj ekde 2000). Vicprez. de ILEI (1989-92), prezidanto (1992-94). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-95).

Gvidis kursojn kaj ekzamensesiojn en multaj landoj. Kunlaboras en la lanĉado de la ekzamenoj de UEA/ILEI laŭ la Eŭropaj normoj kun oficiala agnosko.

Prezidanto de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (2009-2013)

Vic-prezidanto de UEA (2013-..)

Profesie 1989-2010 verkis help-tekstojn por komputilaj programoj (i.a. optika karaktero-rekono). Esploras lingvo-didaktikon kaj preparas E-instrumaterialojn. Vivas en Hungario de post 1986. Havas tri filinojn, Karina (1990), Hajnal (1992) kaj Sonja (2000) – denaskajn esp-istojn.

### Eldonaĵoj:

- 1979 La laŭta vekhorloĝo. 32-paĝa legolibro.
- 1981 Tridek roluloj. 84 paĝoj. Kvin teatraĵetoj por lingvo-lernantoj.
- 1985 Pordoj. 88 paĝoj. Simplaj teatraĵetoj por lingvo-lernantoj.
- 1986 Streĉ' eĉ, Steĉj Skeĉ'. 88 paĝoj. Ne-simplaj skeĉoj.
- 1989 La laŭta vekhorloĝo. 200 paĝoj. HEA. Kvar rakontoj kun ekzercoj.
- 1989 Gvidilo por la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.
- 1991 Najbaroj kaj boroj. 216 paĝoj. Edistudio. Du teatraĵoj kun ekzercoj.
- 1991 Tendaraĵ tagoj: kajero 1: (1991), kajero 2 (1992), kajero 3 (1993)
- 1996 Mazi en Gondolando: traduk-helpado. Apoga materialo (ne eldonita).
- 1998 Ekzercoj por la vid-bendo 'Pasporto al la Tuta Mondo'.
- 2006 Kontribuinto kaj kunlaborinto en Manlibro de Esperanto, ILEI, 200p.
- 2007 Nemave Edifi, FEL, 264 p. Kvar teatraĵoj, sep eroj.